



# «LE GROUPE ESPERANTO DU MAINE» SALUTAS VIN!



## Bonvenigaj vortoj

«Timigu min, kaj mi obeos honte ; konvinku min, kaj mi obeos volonte»

Marjorie Boulton

## Enhavo

Zamenhofa Tago en Tours	P1
Lingva evoluo Frank	P2-3
Homaj rajtoj	P4

*Bonan someron al ĉiuj!*



## PASPORTA SERVO

<https://www.pasportaservo.org/>

Restu senpage en hejmoj, gastigu interesajn homojn de ĉiuj aĝoj, praktiku Esperanton. Ekde 1974, miloj da vojaĝemuloj uzis kaj daŭre uzas Pasportan Servon.

## Regiona Zamenhofa Tago

2023

### Vizito en la Muzeo de Metikompanioj

*De menso el mano...*

*en la urbo Tours*

Kio estas la metikompanioj? Metikompanioj aperas fine de la Mezepoko (15a jarcento). Ili regroupas diversajn asociojn (nomitajn movoj, societoj...) de laboristoj kaj metiistoj de ĉirkaŭ tridek metioj. Iliaj celoj estas la solidareco inter kompanianoj, la profesia perfektigo kaj la transdono de moralaj valoroj. Ĉiu estonta kompaniano devas vojaĝi dum pluraj jaroj (Rondiro de Francio), fari kiel eble plej perfektan objekton (ĉefverkon aŭ akceptolaboraĵon) kaj montri homajn kvalitojn por povi esti integrita en metikompanion dum ceremonio (la Akcepto). Tiam li akceptas metikompanion nomon (ekzemple: "Tourangeau la Fidélité", Turano la Fideleco), unu aŭ kolorojn (rubandojn) kaj marŝbastonon (emblemon de la Rondiro de Francio).

Ekde 2010 metikompanioj estas agnoskataj de la UNESKO kiel nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro.

<https://www.museecompannage.fr/accueil>



## La Muzeo de Metikompanioj De menso el mano...

La muzeo estas fondita en 1968 en la malnova Sankta Juliano abatejo (13-a 18-a jarcentoj).  
Gi ŝirmas riĉan kolekton prezentantan historion, metiojn kaj simbolojn de la Kompanioj de la Rondiĝo de Francio.

### METIKOMPANIOJ HODIAŬ

En unu salono prezentiĝas nuntempaj ĉefverkoj (akceptolaboraĵoj), objektoj antaŭnelonge akiritaj aŭ restaŭritaj de la muzeo, temaj nedaŭraj ekspozicioj.

Klaŭnŝuoj, far la kompaniano ŝuriparisto-botisto "*Languedoc la Franchise*", (Langvedoko la Sincereco), 1937.



Nimfea mansako, akceptoiaboraĵo de la kompaniano ledajisto "*Aunis Coeur Loyal*", (Aŭniso Koro Lojala), 2010



*Les Hospices de Beaune* el pastaĵoj, 1976  
de "*Bouguignon le Disciple de la Sainte-Baume*",  
(Burgonjano, disciplo de la Sainte-Baume).

## Kelkaj metioj reprezentataj en la muzeo de Tours

JUNGILISTOJ-SELFARISTOJ

ŜURIPARISTOJ-BOTISTOJ

HUFOFERISTOJ

SERURISTOJ-FORGĜISTOJ

TEGMENTISTOJ-ZINKISTOJ

PLUMBISTOJ

MASONISTOJ ŜTONTAJLISTOJ

GIPSISTOJ

BARELISTOJ-BARELTABULISTOJ

ĈARFARISTOJ

LIGNOŜUISTOJ-LIGNAĴISTOJ

MEBLISTOJ

ĈARPENTISTOJ

METIOJ DE NUTRAĴO



Fotis membroj de la GEM

Tradukis de la franca dokumento: la grupo de Tours

1887-2023

## La artefarita lingvo Esperanto kaj evoluo de kvar naturaj lingvoj

### Dua parto 1918-1945

La esperanta lingvo konis la negativajn sekvojn de la unua mondmilito kaj samtempe travivis gravan krizon komence de la rusa revolucio. Fakte la esperantista movado estis malfortigita de la socia kaj interna politika oponoj, de divido, eĉ de hato, inter la laborista tendaro kaj la nomita prokapitalista grupo de UEA (Universala Esperanto Asocio). Fakte la evoluo de la problemo (ĝis hodiaŭ) montris kaj montras, ke povas spruĉi nova reganta-ekspluatora klaso ene de la supozita laborista klaso.

Lasante tiun interesan aspekton, la rusa revolucio okazigis grandegan disvolviĝon de Esperanto kiel laborista, progresiva, revolucia lingvo ene de la socialistaj branĉoj (anarkiista, komunista, socialista) de ĉiuj kontinentoj.

Tamen en Sovetio la esperanta lingvo sekvis sian kreskantan disvolviĝon. Ekzemple, la transendo de novaĵoj pri iu angla striko estis pli rapide pere de Esperanto ol ene de la rusaj gazetoj. Ankaŭ en la poŝta interŝanĝo, la esperantistoj estis kapablaj komuniki, al la esperantistoj de aliaj landoj, siajn sentojn pri la sovetiaj tagaj vivaĵoj. La esenco mem de la marksismo leninismo ne povis toleri tiun sintenon ĉar nur la oficialaj responsuloj elektitaj de la partio devis disdoni la korektajn novaĵojn laŭ la politikaj bezonoj de la interna kaj ekstera situacio de la partio. Iniciati sen tuj konsento de la komunistaj responsuloj estis politika senkonscia deĵoro, inkluzive etburĝa aŭ anarkiista eraro, komenco de ebla sabotado.

Feliĉe, la BKP (bolŝevika komunista partio) intervenis «!» forigante la herbaĉon konservante nur la fekundan herbon kiu ĉiam estos forta sterko por la proletaro. La bolŝevika esperanta movado estis sanigita «!» de la ĝusta kaj saĝa rimedo pere de la periodo de la jaroj 1936-1939. La pafekzekutado de la tri-kvaronoj de la centra komitato evitis «!» aliajn erarojn. La esperanto ne malaperis, ne estis malpermesita, sed ne plu estis uzita. Dum la dua mondmilito E.o ne estis videbla en Sovetio.

Paralele, surpriza fenomeno aperis en la itala faŝismo kiu adoptis la esperantan lingvon kiel propagandan ilon. Male, en la germana hitlera faŝismo en la fama libro de Hitler *Mia Lukto* okazis stranga amalgamo: «Tiel longe kiam la judo ne fariĝis majstro de aliaj popoloj, li devas, vole nevole, paroli la lingvon de aliaj homoj. Tamen, tuj kiam tiuj popoloj fariĝos liaj vasaloj, ili devigos lerni iun universan lingvon (ekzemple Esperanton) por ke ili estu superregitoj, tiumaniere, pli facile de la judismo» (p. 187, en la ĉilia versio).

La germana faŝista logiko konsistas en la fakto ke Zamenhof, pro siaj judaj deveno kaj kulturo, uzis la esperantan lingvon kiel instrumenton de la supozita juda sturmo kontraŭ Germanio.

La eŭska lingvo ne konis ŝanĝojn.

La hebrea lingvo akiris kelkajn fortojn kaj helpojn nur en Palestino. En 1922 la ligo de la Nacioj donacis al Britio mandaton por zorgi la situacion en Palestino. La artikolo 22 de la teksto estis: «La angla, la araba kaj la hebrea lingvoj estos la oficialaj lingvoj de Palestino». La frazo kun la verbo «esti» skribita en la futura formo sugestis, ke la hebrea ne ekzistis en 1922 en la juda popolo.

Fakte, la juda rusano, kiu iris Palestinon en 1881, Eliezer Ben Yehuda (ruslingve, Eliezer Iĉhak Perlman) ellaboris novan hebrean lingvon, pere de la influo de eŭropaj lingvoj, sed kiam li

mortis en 1922 estis nur du hebreatparolantoj: sia filo kaj sia filino! Tamen, la lando ne estis preta por akiri la hebrean lingvon. Kompreneble, la militaj kaj enaj problemoj inter cionistoj (Ĵabotinski estis admiranto de la itala faŝisto Mussolini, male de aliaj cionistaj ĉefoj) prokrastis la lernadon de la nova hebrea lingvo.

Tamen, fine de 1930 komencis la hebrea lingvo disvastiĝi inter la cionistoj en Palestino.

Rilate la makedonan lingvon, al la fino de la unua mondmilito, Makedonio estis dividita inter Serbio, Grekio kaj Bulgario. Grekio malpermesis la makedonan lingvon. Bulgario, kiel antaŭe, konsideris ke ne ekzistis malsamecoj inter la bulgara kaj la makedona. En Serbio, la makedona lingvo estis sub la lingvo-premo de la serbakroata administracio. La celo konsistis en progresiva premo (politike influita de serbaj vortoj) por, artefarite aŭ ne, dissendi la makedonan lingvan varianton de la bulgara lingvo, anstataŭ la bulgaran.

Dum la dua mondmilito la makedonaj komunistaj partizanoj disvolvis sian propagandon makedone. En 1945 estis kreita la popola respubliko de Makedonio kun sia propra lingvo, ene de Jugoslavio.

La apero de la makedona lingvo kiel sendependa lingvo estas ne komprenebla lingva fenomeno. Nur la skismo inter la leninista Jugoslavio kaj la leninista Sovetio (kun ĝiaj «kolonioj») klarigas, eĉ pravigas, la uzon de la supozita makedona lingvo.

Jugoslavio fortigis duoblan baron inter Makedonio kaj Bulgario en la lingva kaj en la kultura tavoloj.

Cetere, la makedonaj leninistoj uzis la bulgaran gramatikon kaj imponis aliajn prononciojn. Samtempe, ili eldonis historiajn librojn kun la samaj datoj kaj eventoj kiel en la bulgaraj libroj, sed kun la ridinda paradokso prezenti ĉiujn gravajn historiajn faktojn okazitajn en Bulgario kiel «aŭtentike kaj sole» okazitajn en Makedonio.

Rilate la valencian lingvon la situacio stagnis.



*La valencia flago*



*La eŭska flago*

А Б В Г Д Ѓ Е  
Ж З С И Ј К Л Љ  
М Н Њ О П Р С Т  
Ќ У Ф Х Ц Ч Џ Ш

*La makedona alfabeto*

א ב ג ד ה ו ז ח ט י כ ל מ נ  
Mem Mem Lamed Kaf Kaf Yod Tet Chet Zayin Yod He Dait Dait Bet Aleph

נ ו ס ע פ פ צ ק ר ש ת  
Tet Mem Lamed Kaf Kaf Tet Tet Peh Peh Ayin Dait Dait Mem Mem

*La hebrea alfabeto*

**Verkis Frank Mintz**  
*Daŭrigo en la venonta bulteno...*

## UNIVERSALA DEKLARACIO DE LA HOMAJ RAJTOJ

Adoptita kaj proklamita de Rezolucio 217 A (III) de la Ĝenerala Asembleo, 10<sup>an</sup> de decembro 1948

### Artikolo 2

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato. Plie, nenia diferencigo estu farata surbaze de la politika, jurisdikcia aŭ internacia pozicio de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas la koncerna persono, senkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratoreco, ne-sinreganta aŭ sub kia ajn alia limigo de la suvereneco.

### Artikolo 9

Neniu suferu arbitrajn areston, malliberigon aŭ ekzilon.



*La teksto de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj disponeblas ĉe la [retejo de Unuiĝintaj Nacioj](#).*



#### 10 principoj de milita propagando, unue listigitaj de la brita diplomato lord Ponsoby en 1914:

- 1 Ni ne deziras militon  
(Kompreneble, ni ĉiuj estas pacemaj homoj!)
- 2 Nur la alia flanko respondecas pri la milito  
(Bedaŭrinde, la malamiko trudis tiun militon al ni.)
- 3 La malamiko havas la vizaĝon de la diablo  
(Vera monstro atakis nin, vidu!)
- 4 Noblan kaŭzon ni defendas kaj ne proprajn interesojn  
(Ni defendas civilizacion, kontraŭ barbaroj, ni estas altruismaj.)
- 5 La malamiko konscie provokas kruelaĵojn, se ni faras misagojn, estas nevole  
(Civilizitaj pacemaj homoj, kiel ni estas, ne povas fari kruelaĵojn, kompreneble, nur bedaŭrindajn erarojn.)
- 6 La malamiko uzas nepermesitajn armilojn  
(Tio estas normala afero, kiam temas pri barbaroj, ili ne povas kavalirece batali kiel ni.)
- 7 Ni suferas malmulte da pereoj, tiuj de la malamiko estas egaj.  
(Tial ni venkos la barbarojn.)
- 8 La artistoj kaj intelektuloj subtenas nian kaŭzon  
(Ankaŭ saĝaj kaj kleraj homoj subtenas civilizacion.)
- 9 Nia kaŭzo havas sanktan karakteron  
(Kaj kompreneble veraj dikredantoj subtenas nin.)
- 10 Tiuj, kiuj esprimas dubojn pri la propagando estas perfiduloj  
(Kaj ankaŭ vi, kiuj vizitas tiun ekspozicion kaj legas tian libron!)